



Karaj geamikoj,
jen tute konciza AVENO – sen la detalaj informoj pri ekologio, ekonomio, Homaj kaj Bestaj Rajtoj, kaj unuopaj Verdaj Partioj. Semajna ret-mesagho, koncize kolektita de tempo al tempo sur nia retejo: www.verduloj.org/aveno.htm

La Asocio de Verduloj Esperantistaj estas malgranda Civil-Socia Organizaĵo; ni estas nura reto da homoj, neformala asocio. AVE-anoj parolas Esperanton kaj estas Verduloj (membroj aŭ simpatiantoj de Verdaj Partioj) favoras ekologian, socialan, pacan kaj viv-subtenan politikon. AVE pensas pri la tuta mondo; niaj membroj agas surloke. Ni celas informi niajn geamikojn en politiko kaj en Ne-Registaraj Organizaĵoj pri la avantaĝoj de Esperanto kaj reciproke. Detalojn pri tio vi trovos che AVENO 40, kaj sur nia retejo: verduloj.org

Renkontighoj de AVE:

2017 Liverpool, AVE partoprenos je la Globala Verdpertia Kongreso: globalgreens.org

Raportoj:

2015-05-15/17 Zagrebo, Konsilio de Europa Verda Partio.

Mi partoprenis kiel reprezentanto de AVE kaj disdonis flugfoliojn pri AVE, 37 flugfoliojn en la angla lingvo kaj 10 en Esperanto.

Dum la konsilio mi auskultis multajn interesajn prelegojn kaj diskutojn pri dauripova energetiko, klimataj shanghoj, ekstremismo, populismo.....

Inter alie, la Konsilio akceptis rezolucion kontraŭ TTIP kaj CETA – nedemokratiaj sekretaj interkonsentoj de EU estraranoj kun Usono kaj Kanado. TTIP kaj CETA estas por profito de grandaj korporacioj kaj por malprofito de popolo. Mi konversaciis kun miaj europaj verdaj konatuloj kaj kun nov-konatuloj: el Kartvelio, Rusio, Irlando, Belgio, Slovenio, Britio, Iran-devena Usonano, „Verduloj“ kaj „Maldekstraj Verduloj“ el Nederlando; kaj kun la prezidantino de kroata verda partio OraH, Mirela Holy, kaj ties MEP Davor Škrlec. Esperantistoj kaj Verduloj estas similaj homoj: bonintencaj kaj kosmopolitaj.

(raporto de Sinisha Dvornik, Zagrebo)

2015-07-28 Lille, 100a UK, Kunveno de AVE

Cheestis 50 partoprenantoj. Betty prezentis la trian projekton PIEADC „Akvo por Kalima“ D.R. Kongo. Je la Movada Foiro, dum la Faka Gicheto kaj la AVE-kunveno ni kolektis entute 480 Eurojn por tiu projekto.* Interesa demando estis, ĉu subteni tiun projekton antaŭenigos Esperanton en la DR Kongo? Ni ne certas, sed ĉiukaze ghi helpas kaj pli-vastigas la informojn pri Esperanto en tiu regiono.

Renee disdonis informilojn pri „Alternatiba“, CSO, por subteni klimato-favoran politikon – bonvole serchu sur la unua ret-pagho de verduloj.org.

Krome ni parolis pri la agado de AVE en kadre de la Verdaj Partioj, lau-lande kaj tutmonde. Sekvis riproĉoj, kial la Verdaj Partioj sur-papere akceptas Esperanton, sed la politikistoj ne agas por ties enkonduko, ekz- en la Europa Parlamento. Do, fakte ni ja povas uzi la pozitivan sintenon de la Verdaj partioj; sed ne ĉiuj partiaj altranguloj konsentas; la bezonatan agadon devas fari ni esperantistoj ene de la partioj – kompreneble tio rilatas ankaŭ al aliaj partioj.

Aparte menciinde estas, ke Ulrike Lunacek, membro kaj vic-prezidantino de la EP por la frakcio Verduloj kaj Regionalistoj, salutis la UK-on – kion ni audis dum la Solena Malfermo. Supozeble Walter Klag en Vieno tre dankinde instigis shin. Ursula Grattapaglia rakontis ke la franca senatano Joel Labeta de EELV konfirmis al shi en la lasta Rio-konferenco, ke li subtenas la ideon de Esperanto. Michael Leibman, de la francaj Verduloj kontaktos lin. AVE

havas ne tre aktivan diskut-grupon „Verduloj“ sur Ipernity.com. Li ankaŭ diris ke necesos trovi sekretarion dum la sekva jaro, ĉar Manfred post 25 jaroj finos tiun laboron. *) Sukcesa kolekto: Al la AVE-konto avex-z alvenis 2.500 i.a. dank al Betty, Catherine kaj Taesok. Ni ricevis 5000 denove de WKV AG; 2000 de Stiftung Brücke, Germanio.

Pri la evolu-subtenaj projektoj ni raportis en AVENO 40 kaj detaloj trovighas sur www.verduloj.org/afriko.htm

Bonvolu subteni la projekton Mazingira ghirante al la UEA-Konto: avex-z

IBAN: BE66 0000 2653 3843; BIC: BPOTBEB1 de la Flandra Esperanto Ligo, Antwerpen, bonvolu menci: Mazingira, temo & via nomo

Adreso: c/o Mramba Simba Nyamkinda, P.O.Box 51, BUNDA, Tansania. www.kono.be/mazingira/

PIEADC en Kalima, D.R. Kongo, tie Etienne Katchelewa (UEA-konto: ekkn-y) organizis por reaktivigi agro- kaj fish-kulturadon, kaj agadas por solubra trinkakvo por Kalima: www.kampanasolidareco.weebly.com

AVE kunlaboras kun:

Verdaj Partioj surloke, regione, tutmonde:

Francio: lesverts.fr/article.php3?id_article=645

(de) gruene-jugend.de/nachrichten/98888.html

(eo) gruene-jugend.de/aktuelles/111036.html

Verda Europa Fonduso lanchis sub-pagharon "en aliaj lingvoj", ili vidis, ke la angla ne sufichas: (en, aliaj) www.gef.eu, serchu „partio“ sur nia retejo verduloj.org

UEA: rilate AGENDOn 21: AVE ekde 1998 proponadas amendon de la UEA-Statutoj per la temo "dauripovo" - lau la Pinto-Kongreso pri la tutmonda naturmedio en Rio de Janeiro 1992, Rio+20. AVE kunlaboras kun aliaj CSO-oj.

AVE konsistas el ĉ. 320 membroj, parte Verd-partianoj.

Bonvolu informi nin se vi aktivus (pli aŭ malpli) en iu ajn NRO/CSO aŭ partio. Tio gravas por nia statistiko. Bonvolu membriĝi en Verda Partio de via lando – vizitu globalgreens.org/federations > About us > Green Federations

AVE-Kotizo: libervole paginda kotizo: 5+x Euro

UEA-Konto de AVE: „avex-z“ au al la konto de UEA:

ING: BIC/SWIFT: INGBNL2A, IBAN:

NL72INGB0000378964. Ne forgesu menci: ("via nomo" por konto avex-z). AVE sekretario:

Manfred Westermayer

Kandelstr. 62, DE-79194 Gundelfingen/Brsg

ave@verduloj.org

retejo: verduloj.org

AVE-anoj pensas tutmonde & agas surloke kaj regione.

